August Graf von Platen-Hallermünde,

# La tombo en la Busento

*tradukita de H. Gerke*

Nokto estas. Ĉe Kosenco,
kie la Busento ondas,
murmuretas surdaj kantoj,
de la akvo bru' respondas.

Sur la bordo tien-reen
movetiĝas kvazaŭ homoj:
mortis reĝo Alariko,
ploras gotaj la fantomoj.

Malproksime de la hejmo
la aspiroj neniiĝis,
malgraŭ ke sur liaj ŝultroj
bukloj de l' junec' ondiĝis.

Jen — fluejon novan fosis
la herooj tre profundan,
kun fervoro devojigis
la riveron, la abundan.

Sur malplena fundo ili
laboradis — jen kavaĵo!
entombigis la mortinton
sur ĉevalo kun armaĵo.

La trezoron sian karan
ili kaŝis en la tero,
ke elkresku el la tombo
kreskaĵaro de l' rivero.

Rekondukis la riveron
per fervora laborado;
ree la antaŭan vojon
ŝaŭmis ĝi kun ondegado.

"Dormu en honor', heroo!"
kantis la funebra ĥoro,
"la avidon kontraŭstaru
via tombo, via gloro!"

. . .

August Graf von Platen-Hallermünde,

# Das Grab im Busento

Nächtlich am Busento lispeln,
bei Cosenza, dumpfe Lieder,
aus den Wassern schallt es Antwort,
und in Wirbeln klingt es wider!

Und den Fluss hinauf, hinunter
ziehn die Schatten tapfrer Goten,
die den Alarich beweinen,
ihres Volkes besten Toten.

Allzufrüh und fern der Heimat
mussten hier sie ihn begraben,
während noch die Jugendlocken
seine Schulter blond umgaben.

Und am Ufer des Busento
reihten sie sich um die Wette,
um die Strömung abzuleiten,
gruben sie ein frisches Bette.

In der wogenleeren Höhlung
wühlten sie empor die Erde,
senkten tief hinein den Leichnam,
mit der Rüstung, auf dem Pferde.

Deckten dann mit Erde wieder
ihn und seine stolze Habe,
dass die hohen Stromgewächse
wüchsen aus dem Heldengrabe.

Abgelenkt zum zweitenmale,
ward der Fluss herbeigezogen:
Mächtig in ihr altes Bette
schäumten die Busentowogen.

Und es sang ein Chor von Männern:
"Schlaf in deinen Heldenehren!
Keines Römers schnöde Habsucht
soll dir je dein Grab versehren!"

. . .

Kaj la himno sonegadis
tra la gota heroaro,
rulu ĝin, Busento-ondo,
rulu ĝin de mar' al maro.

*Traduko de la Germana poemo "Das Grab im Busento" de* August Graf von Platen-Hallermünde *(∗1796 – †1835) en Esperanton de H. Gerke.*

*Arg-840-1689 (2014-02-12 15:59:46)*

*Tiu ĉi traduko aperis en 1950 en „La Praktiko", Den Haag, Nederlando, n-ro. 9-12 (155-158), septembro-decembro 1950, (14-a jaro). Vidu ankaŭ:* http://www.literaturo.dk/busento.htm*.*
*Pri la rivero Busento vidu:* http://de.wikisource.org/wiki/Das_Grab_im_Busento*. Pri la tradukinto nenio estas trovebla en la interreto. Vidu ankaŭ:* http://www.mein-italien.info/it/letteratura/tomba-busento.htm*. Pri la gazeto "La Praktiko" vidu:* http://books.google.de/books/about/a_Praktiko.html?id=iG7lAAAAMAAJ&redir_esc=y*.*

Sangen's, und die Lobgesänge
tönten fort im Gotenheere;
wälze sie, Busentowelle,
wälze sie von Meer zu Meere!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* August Graf von Platen-Hallermünde *(∗1796 – †1835).*

*Arg-840-1688 (2013-02-22 19:50:32)*

*La teksto troviĝas interalie en* http://www.alarico.org/das_grab_im_busento_.html*,* http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/pla_av.html *kaj* http://de.wikisource.org/wiki/Das_Grab_im_Busento*.*